

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

N-ro 14 * 8. Jan. 1921

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

* Eliras semajne. *

ET en 1921.

Ni tre dezirus, ke ET povu aperi en duobla amplekso. La redaktado estus pli simpla, kaj ni ne bezonus praksi ĝis senfina multajn bonajn artikolojn de niaj kunlaborantoj. Ni povus minimume tri paĝojn disponigi tute al la fakoj Scienco-Tekniko, Arto kaj Literaturo, kiuj nun estas tre malzorgataj en ET. Sed por atingi tion, kelkaj miloj da abonantoj estas necesaj. Nun eĉ la eldono de kvar paĝoj rezultigas deficiton. Do en la nova jaro ni devos pli ol ĝis nun propagandi por akiri novajn abonantojn kaj pagatajn anoncojn, kaj ankaŭ niajn amikojn ni petas pri varbado de abonantoj kaj pagataj anoncoj. Ĉiu, kiu varbos al ET en 1921 dekludu da novaj abonantoj, ricevos premie ekzempleron de la romano „La Senlingvulo“ en libra formo.

Ĉiokaze ni persistos en la eldono de la ĉiusemajna jurnalo, spite la grandegajn malfacilaĵojn. Kaj, ne povante realigi la ok-paĝan ET en antaŭvidebla tempo, ni meditas pri eldono de specialaj numeroj por Scienco-Tekniko, Arto kaj Literaturo.

Por limigi la elspezojn kaj plialtigi la enspezojn de nia jurnalo, ni estonte ne plu forsendos centojn da ekzempleroj de ĉiu numero, kiel ĝis nun ni faris, al eminentuloj, leĝejoj, gazetoj ktp., kaj ne plu enpresos senpagajn anoncojn.

Kun la Esp. gazetoj ni estas emaj interŝanĝi nian jurnalon: kun „Esperanto“ de UEA, „Esperanta Finnlando“ kaj „Internacia Komerca Revuo“ po 2 ekz., kun la ceteraj malpli gravaj gazetoj esperantistaj regule elirantaj po unu de ET kontraŭ 2—5.

Anoncoj kostos estonte po kvadrat-centrimetro 1 gmk., 0,10 hfl., 0,20 sv.fk., 0,50 fr.fk., 2 pencoj, 2 hung. kr. ktp., kun rabato ĝis 40% ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj, kaj kun speciala rabato de 20% por niaj abonantoj.

Anoncoj kostos: 2-foja enpresado 3 gmk. (1 fk., 6 hung. kr.), 5-foja enpresado 6 gmk. (2 fk., 12 hung. kr.).

La abonprezoj estos provizore moderigataj por la landoj kun alta valuto, por la aliaj landoj ili restos kiel ĝis nun. Ni petas niajn reprezentantojn en la diversaj landoj pagi ĉiujn mendojn ĝis nun peritajn, ĉar ni deziras starigi de nun novajn kontojn.

Responde al multaj demandoj ni ripetas, ke ET n-ro 1—6 estas elĉerpitaj. Haveblaj estas nur la specimena numero kaj la numeroj 7—15. Al kelkaj germanaj demandintoj ni respondas, ke ili pagu po n-ro 1 mk., egale por kiom da n-roj ili pagas.

Abonojn al ET

oni bonvolu pagi per resp.-kup. (15 por 10 n-roj) aŭ prefere per ŝtataj bankbiletoj. Ni liveros por 20 gmk. 12 n-rojn de ET, por 10 ŝil., 10 sv. fk., 10 pesetoj, 10 nordaj kronoj aŭ 5 hfl. 50 n-rojn, por 10 fr. fk. aŭ 1 dolaro 25 n-rojn, por 10 italiaj liroj 15 n-rojn, por 10 finnaj mk. 10 n-rojn. — Tiuj ĉi prezoj valoras por ĉiuj landoj kun valuto pli alta ol la germana. Al Germanio, la Balkanoj aŭ la Baltikaj landoj ni liveros 10 n-rojn por 10 gmk., al Ĉeĥoslovakio 15 n-rojn por 20 Kč. Specialajn prezojn por Aŭstrio, Hungario, Polio kaj Estonio oni demandu ĉe niaj respektivaj reprezentantoj.

Niaj Abonejoj.

AŬSTRIO.
Esp.-Societo por Stirio, Graz, Schönaugasse 6.
ĈEĤOSLOVAKIO.
Otto Sklenčka, Hradec Králové.
Prof. J. Süßner, Saaz 687.
ESTONIO.
Helmi Dreen, sekretario de Est. Esp. Unuiĝo „Espero“, Rütüli t. 6, Tallinn.
GERMANIO.
Postisĉekkonto Köln 708 65, Teo Jung, Horrem Bez. Köln.
HUNGARIO.
Paŭlo Balkanyi, Budapest, Hajos-utca 15, II, 2.
POLIO.
Adolfo Oberrotman, Warszawa, Krak. Przedm. 10.
PORTUGALIO.
Agencia Esperantista, Silva & Carreira, Rua da Assunção 42, 3.

Esperanto-Preĝo.

Ho, spirito, kiu regas kuron de la steloj,
Kiu sendas benigitan lumon de l' ĉielo,
Kiu malsekigas herbojn, ankaŭ nutras bestojn,
Pro la akra frosto donas riĉe varmajn vestojn!

Verŝu en la homajn korojn sanktan pacspiriton!
Via amo inter ili rompu la milition!
Lasu pluvi benon sur la kampon traplugitan
De l' animo, per maturaj grenoj plensemitan!

Via voĉo sonas en la muĝo de la vento,
En la tondro forte ĝi parolas al la sento,
Kaj la montoj predikadas vian grandan gloron,
Kiam suno pruntas al la suproj brilajn oron!

Kaj la floroj montras vian arton de la manoj!
Vin adoras ĉiulande, ĉiumare anoj!
Senvolora estas ĉia fero kaj laboro,
Se la dia kontenteco mankas al la koro!

Se ni proksimiĝas nun humile vian tronon,
Donu al la serioza volo vian kronon!
Repacigu ĉiujn homojn, nenigu la batalon,
Kaj konduku la homaron en la paceternan halon!

F. J.

De la ŝatata frato de nia kara majstro ni ricevis artikolon, kiu estas certe priatentinda kaj pridiskutinda, ĉar ĝi tuŝas vere aktualan demandon: ĉu la t. n. internacia ideo estas necesa kaj utila aŭ ne aŭ kondiĉe? La redaktoro de ET klarigis sian opinion pri tiu temo jam en la specimena (aprila) numero de sia jurnalo, sed tre volonte aŭdas la voĉojn de aliaj kompetentuloj.

Samideanoj, kiuj deziras interkorespondi pri la temo kun la aŭtoro kaj deziras ricevi detalojn, skribu laŭ la adreso: D-ro Leono Zamenhof, Warszawa (Polujo), Marszałkowska 125. Pro la multekosteco de la korespondado (Polujo havas nun eble la plej altan poŝtan tarifon) estas dezirinde aldoni respondokuponon.

La animo kaj la korpo de Esperanto.

Ĝi venis en la mondon kun malgranda korpo kaj granda animo. Ĝia unua apero elvolvis ĉe la homoj nur mokoĝin. La homaro rigardis ĝin komplete kvazaŭ pigmeon celantan detrui tion, kion sanktigis la jarcentoj — la barojn inter la popoloj.

La etulon tamen ne fortimigis la mokoĝi, la atakoj de kaŝaj kaj malkaŝaj ĝiaj malamikoĝi. La granda spirito, kiu vivigis ĝin, ne permesis al ĝi perej, kaj ĝia korpo pli kaj pli fortiĝis.

La eta korpo de Esperanto fariĝas hodiaŭ jam grandkreska. La homaro, kiu antaŭ nelonge malŝatis la etulon, rigardas ĝin hodiaŭ per tute aliaj okuloj. Tiu ĉi ŝanĝo en la opinio de la mondo ĝoigigas kompreneble nin ĉiujn, kiuj ĉiam kredis, ke tiu momento nepre devas veni.

Sed nun en tiu ĉi transira periodo de nia movado, ĝojante pri la kresko de nia lame etulo, ni ne devas forgesi, ke ĝi venis en la mondon kun animo, sen kiu la vivo de Esperanto povas estonte okazi sencela.

Sian aperon Esperanto dankas nur al sia internacia ideo, kiu sentis la neceson ĝin naski. Esperanto venis en la mondon, ne nur kiel senspirita ilo celanta faciligi diversnaciajn negocojn, sed antaŭ ĉio alproksimigi la spiritojn de la disbalita homaro.

Tiel longe, kiel nia ideo travivadis sian periodon de propagando, ĝiaj unuaj pioniroj zorgante pri ĝia kresko samtempe zorgis pri la prospera evoluo de ĝia animo. Kaj la internacia ideo de Esperanto entuziasmigis ilian laboron.

Nun, kiam Esperanto eble en tre malproksima tempo transiros en la periodon de praktika vivo kaj fariĝos tutmonda propraĵo, kun ĝi povas okazi tio, kio okazis jam kun ĉiuj grandaj ideoj, kiujn la homaro en la praktika apliko aliformigis tute por sia sendeja uzado*.)

Kvankam ni kredas, ke tutmonda interkomprenilo per si mem malgraŭ ĉiuj homaj malvirtoj malakrigos la homan disigon, ni opinias tamen, ke la unuaj batalantoj por la Esperantismo ne

*) Tiujn ĉi simptomojn ni observas ĉe esperantistoj jam de kelka tempo. La batalo inter diversaj partioj kaj obsidita reformemo de kelkaj el ili, kiuj kreinte nenion novan revas nur pri propraj aferoj, estas nur la sekvo de tio, ke por ili estis fremda la internacia ideo de Esperanto.

devas ripozi, kredante ke ili faris ĉion por venko de nia ideo. La eksterordinaraj nunaj tempoj des pli devigas nin proklami al la mondo, ke ni batalis ĝis nun ne nur por konkondi Esperanton kiel lingvon internacian, sed ankaŭ por repacigi la mondon.

Tiel longe kiel vivas ankoraŭ la unua generacio de esperantistoj-samideanoj, la internacia ideo de Esperanto devas esti ĝia celo, kaj Esperanto mem nur ilo por ĝin atingi. Se ni kontentigos per sukcesoj de Esperanto kiel lingvo internacia kaj forgesos pri nia jama juro esti fidelaj al ĝia internacia spirito, ni haltos sur la duono de la vojo.

Neniam la neceso subteni la pacigan ideon de Esperanto estis tiel forte sentebila kiel en la nuna momento. La tutmonda milito, restariginte grandan nombron de katenigitaj ĝis nun popoloj, samtempe starigis novajn barojn inter la dispeĝigita popoloj. La mondo estas nun ŝajne malmilitigita: ĉirkaŭe regas fajrigila atmosfero, ĉar la popoloj ne estingis ankoraŭ en siaj animoj la bruligantan flamon de reciproka malkonfido.

Kiu pli ol esperantistoj estos destinitaj estingi tiun ĉi fajron? La vorta malinterkompreno estis ĉiam la ĉefa kaŭzo de malamikeco. Per Esperanto tiu ĉi baro estas facile forigebla. Ĉu posedante en niaj manoj tiun ilon, ni senpripense forjetos la allogan okazon repacigi almenaŭ parte la homaron? Ni estas certaj, ke neniu esperantisto deklaras sin kiel nura adepto de internacia lingvo. Sed estis adepto de la internacia ideo de Esperanto, tio ne egalas ankoraŭ esti batalanto por tiu ĉi ideo.

La devizo, kiu ornamas nian standardon, estas **espero**, la devizo de tiuj, kiuj estas deciditaj batali por la venko de nia paciga ideo, devas esti **ago kaj espero**. Por ke tiu ĉi ago donu bonajn fruktojn, estas dezirinde, precizigi ĝian formon.

Samideanoj! Ni alvokas vin al la rearĝo sub nia malnova ideo standardo! Inter la estontaj aroj de esperantistoj-adeptoj de la lingvo internacia ni formu arojn de **esperantistoj-samideanoj**, kies devizo estos **per Esperanto al repacigo kaj frateco!**

Varsovio (Polujo), 18. Dec. 1920.

D-ro Leono Zamenhof.

Nia Devizo.

Alvoko por energia propagando ĉiulande.

En ĉiuj landoj ni esperantistaj gvidantoj kaj kune kun ni multnombraj kunlaborantoj disvastigas nian karan Esp. lingvon kaj same ankaŭ la ideon de l' Esperantismo. Sed malgraŭ bonaj klarigaj paroladoj tro multe da neesperantistaj personoj ankoraŭ ne volas kredi, ke ankaŭ en aliaj landoj, eĉ en la tuta vasta mondo, nenombrelaj esperantistoj fervore laboras por atingi nian celon: deviga instruado de Esperanto en ĉiuj lernejoj, uzado de Esperanto ĉe la komercistoj ĉiulandaj, korespondado, parolado, pritraktado kaj diskutado, do la tuta interrilatado internacia per Esperanto.

Mi bone scias, ke estas malfacile, diskonatigi nian karan ĉiulandan laboron, ĉar multaj personoj aŭ ne havas sufiĉe da tempo por ĉesiti niajn klarigajn paroladojn, aŭ eĉ ne interesiĝas por nia movado. Sed varbado kaj energia, bone priprenita propagando devas altni amasojn da homoj, por ke ni baldaŭ povu ĝui la grandan benon de komuna uzado de Esperanto. Tiam esperable baldaŭ la ŝovinismo ĉesos kaj fine la scienco, arto, praktiko ktp. eĉ de malgrandaj nacioj pere de Esperanto estos komprenebligataj al ĉiuj aliaj.

Ni nepre bezonas devizon, laŭ kiu ĉiuj esperantistoj devas vige labori kaj kiu montras per malmultaj vortoj trafaj, kion ni volas. Kelkaj klarigaj vortoj antaŭmetitaj devas montri, ke laŭ tio oni agadas en la tuta mondo.

Mi mem jam komencis tie ĉi per tia agado. La malsupre presitan tekston mi presigis sur grandajn afiŝojn, sur invitojn por fondiĝtagesto ktp. Mi uzis ĝin en paroladoj publikaj kaj diris la saman al tiuj skeptikuloj aŭ eĉ kontraŭuloj, kiuj dubas, ke la Esp. movado plivastigis ĉiutage kaj kiuj diras, ke la disvastigado de Esperanto malsukcesos pro tronaciema ŝovinismo. Oni ofte ne havas sufiĉe da tempo por klarigi al iu persono ĉiujn niajn sukcesojn, niajn dezirojn kaj nian altan celon.

Tial mi petas la tutan esperantistaron, presigi aŭ skribi en nacia lingvo je la komenco de poŝtkartoj, invitoj, flugfolioj, klarigaj presajoj, gazetaj

Nova Dekreto de Instru-Ministro.

Esperanto en bulgaraj lernejoj.

Je la 5. dec. la ministro de la popola instruado akceptis deputitaron de la Bulg. Esp. Societo, kiu petis de li monhelpon por la societa organo kaj ankaŭ, ke li ordonu al la lerneja estraro en la tuta lando disponigi por Esp. kursoj ĉambroj en la lernejoj, ke li rekomendu al la direktoroj kaj lernejestroj favori la Esp. movadon inter la lernantoj ktp.

Nun la ministro kontentigis la peton de la societo. Jen estas elirajo el la cirkulero n-ro 37925 de 20. dec. 1920 de la Ministro, laŭ la teksto presita en la januara numero de „Bulgara Esperantisto“:

Dezirante ne nur ne malhelpi sed eĉ servi kiom eble al la afero de la esperantistoj, la estrata de mi Ministro ĝojas donas al s-roj direktoroj la rajton fari — ĉu senkondiĉe, ĉu laŭeble kun plej malgrandaj laŭ la tempo kaj loko kondiĉoj — la necesan akcepton al la societo en la lernejoj, kaj al la lernantoj permeson vizitadi, se ili deziras, la Esp. kursojn, kiuj ankaŭ povas nur utilon alporti al ili, sed ne malutilon.

Ministro: *St. Omarchevski.*
Ĉefsekretario: *D-ro St. Donev.*
Fakestro: *D-ro F. Manolov.*

Komerco.

OSAKA (Japanio). Tie ĉi fondiĝis komerca firma sub la nomo Internacia Komerca Korporacio, kiu korespondas per Esperanto.

TAIHOKU (Japanio). La firma So-Pekfui, eksportisto kaj importisto, Manka, Taihoku (Formosa, Jap.), kiu komercas formas specialaĵojn, produktajn kaj ankaŭ negocas kiel agentejo komisia de ĉiuj eksterlandaj komercaĵoj, korespondas per Esperanto.

Blinduloj.

SOFIA (Bulg.). En la Blindula Instituto funkcias kurso por blindaj lernantoj gvidata de St. Orozov.

Nekrologio.

S-ino Vidvino Agnes Junker, la patrino de nia ŝatata prezidanto, mortis 70-jara en Köln la 31. dec. 1920. Al ŝia sola filo, ŝiaj du fratinoj kaj la ceteraj geparecoj ni esprimas nian sinceran kondolencan.

Rejnlanda-Vestfalia Esp. Ligo.
Por la estraro: Teo Jung.

Samtempa Propagando.

Germana Esp. Asocio komunikas, ke nun 8 landoj partoprenas en la samtempa sammaniera propagando (Danujo, Hungarujo, Eslando, Holland, Ĉeĥoslovakio, Italio kaj nove aliĝinta Finnlando). Por la venontaj monatoj oni elektis jenan programon:

20. febr.	instruistoj,
27. febr.	studentoj,
20. marto	bontemplanoj,
30. marto	kani-unuiĝoj,
20. aprilo	junulaj unuiĝoj,
20. majo	kolektistoj.

Internacia Esperanto-Servo.

(La traduko kaj la represo en naciaj ĵurnaloj kun aldonado de la vortoj „Internacia Esperanto-Servo“ estas permesata.)

LETERO EL ESTONIO.

Tallinn, 30. dec. 1920.

La definitiva rezultato de la Tutesonia balotado per la elekto de l' unua parlamento de la Estonia Respubliko¹⁾ estas oficiale publikigitaj. Tial mi aperigas ilin ankaŭ en ĉi tiu gazeto. Jen ili estas.

Entute la balotadon partoprenis 71,1% de la tuta nombro de balotgraĵuloj. De ili estas elektitaj en la 100-anan parlamenton:

Partio	Deputitoj
Radikal-progresema laborpartio Tööerakond	22
Bienposedanta-fabrikanta Põllumeeste erakond	21
Estonia socialdemokrata partio	18
Maldependa socialista partio	11
Mezburĝa partio de eks-ĉefministro Tõnnisson, Rahvaerakond	10
Kristana popola partio	7
Komunista partio	5
Germana partio	4
Ekonomia partio	1
Rusa partio	1

Resumante la ĉefajn eksterajn impresojn ricevitajn de ĉi tiu baloto, oni devas konfesi, ke la registaro estis zorginta pri ordo kaj justo; tial eĉ la komunista partio partoprenis la balotojn.

Bedaŭrinde okazis dispezo de paca komunista demonstracio je la unua balotago, same malpermeso de unu propaganda mitingoj²⁾ de la maldependa socialista partio. Tio eĉ iomete plifortigis la bonŝancojn de la ekstremaj maldekstruloj dum la balotoj.

Pro la supraj faktoj la geleĝantoj vidas, ke prevaloras nuntempe la radikal-progresema tendenco ĉe la loĝantaro de Estonio, tendenco socialigema, laŭ kelkaj rilatoj konformaj al la celoj de la angla Labour Party. La plej multe legata gazeto „Vaba Maa“ popularigas similajn ideojn.

Cetere, pri la Estonia gazetaro kelkajn vortojn: aperas proksimume dudeko da ĉiutagaĵ gazetoj, el ili la plej gravaj estas la citita „Vaba Maa“, „Päevaleht“, „Tallinna Teataja“, „Sotsialdemokraat“, „Postimees“ (aperas 2-foje tage). La gazeto estas 4—12-paĝaj (formato de „Esperanto Trifontona“) aŭ 4—10-paĝaj (duobla formato de ET).

H. SAKARIAS.

¹⁾ Estonion regis ĝis nun provizora 120-membra konstituantaro „Asutat Kogu“ kune kun de ĝi elektita ministarkabineto gvidata de ĉefministro.

²⁾ Estus tre interese ekscii, kion opinias allandaj samideanoj pri la esprimo „mitingoj“ signifanta „popola diska kunveno politika“. Aŭ, eble, la formo „mitingoj“ estas pli akceptebla? Mitingoj ne havas la sencon de kongreso (vidu ET n-ro 12).

LETERO EL HUNGARLANDO.

Budapest, Novjaro 1921.

Nova ministraro transprenis la gvidadon de ŝtataferoj, komisiite per la registaro. En ĝi partoprenas ankaŭ liberala politikisto: Lorant Hegedüs, la financministro, kiu ne apartenas al la registara partio, sed kies fakcico — li estas prezidanto de la Peŝta Hungara Komerca Banko — esperigas la senigon de la lando de ĝiaj financaj malsanecoj.

Espereble li sukcesos akiri allandan kapitalpruntojn kaj plibonigi la valuton de la hungara krono. La efektiva valoro ja certe pli alta estas, ol oni ĝin taksas ĉe la allandaj borsoj; ĉar la lando havas produktfortojn, sed ĝi bezonegas eksterlandan kapitalon ĝin ekspluati kaj utiligi. La nova registaro espereble ankaŭ certigos la egaltraĵon kaj la internan ordon de la lando, ke Hungarujo ekiru sur la vojo de konsolidacio kaj kunlaboru eksterlande.

Post du malsukcesaj revoluciaj registaroj transprenis en 1919 la ŝtategadon la kristana nacia partio kune kun la kristan-socialista kaj malgrandbienposedanta partio (partio de vilaĝanoj). Ila devizo estis regi la landon severe nacie kaj kristane. Bedaŭrinde, oni per tio helpis la revengon de antisemitoj, kontraŭsocialistoj kontraŭ gvidantoj de antiaj regadoj kaj la incitoj de la amasaj perfort-agoj, kiujn la registaro dumtempaj oficiale kondamnis, sed malhelpi ne povis. La registaro antaŭa de grafo Teleki fine energie komencis la ordonfaradon, ĉar la perfort-agoj — kiel ĉiam — ne haltis ĉe antisemitaj kaj kontraŭsocialistaj ekscitoj, sed eĉ minacis la ŝtatpotencon kaj atakis policistojn.

La nova registaro, ankaŭ sub prezido de ĉefministro Teleki, daŭrigas firmigi kaj gardi la ordon publikan. La socialistoj kaj demokratroj ankaŭ nun ne estas reprezentataj en la registaro, la socialistoj eĉ ne portoprenis ĉe la parlamentelekto. Laŭ sekreta ĝenerala balotado la regantaj partioj ricevis grandegan plimulton en komenco de 1920. Tiam venis tute novaj homoj en la parlamenton kiuj estis same grandparte ne fakuloj, kiel aliaj partianaj ministroj. Bedaŭrinde la grava, decidiga elekto kaj nomigo tiel per la parlamento kiel por ŝtatestro aŭ ministro devis esti la politika partianeco kaj ne la fakcico!

Interese estas, ke neniu malsanulo lasus sin kuraci per iu, kiu ne estas kuracisto, aŭ estas malbona kuracisto, nur ĉar ĝi estas sampartiano: neniu transdonus siajn jurajn aferojn al nekaj juristo pro simpatio, neniu konstruigus sian domon per homo sampartia, se li ne estas fakulo, — sed kiam oni devas kuraci la vundojn de la patrujo, kiam oni devas aranĝi la jur-aferojn de la ŝtato, kiam oni devas novekonstrui la landon, ĉu ŝajnas memkompreneble, ke ne-fakuloj, sed politikistoj, faru tion?

Nun fine oni nomis ne politikistojn, sed ĉefe fakulojn, ministroj de Hungarujo. Espereble tio finkigos la eksterlandan fidon kaj krediton de la lando multon suferinta.

La nunaj registaroj staras sur bazo de antaŭ-revoluciaj leĝoj kaj deklaris kontraŭleĝaj ĉiujn ordonojn kaj aranĝojn de la revoluciaj registaroj, precipe de la bolŝevikaj. Tial ili — ne, kiel oni pensis en eksterlando, per simpla ekzekutado — sed per juĝtribunalaj akuzoj kaj kondamnoj aŭ forpermesoj aranĝis la laŭ nunaj leĝoj faritajn pekajn kaj kontraŭleĝajn aferojn dum la proletaria diktaturo.

Eble intereso multajn, ke de ties falego ĝis nun dum dekseks monatoj la budapeŝta reĝa ŝtadadvokatejo el 17492 bolŝevistaj kulp-aferoj finis 16638. Ĉe 14255 aferoj oni ĉesigis la kulpigon pro nekulpeco aŭ ne sufiĉe da pruvoj. En 1345 aferoj oni endonis akuzproponon, en 983 okazoj oni kondamnis la kulpigitojn, en 87 okazoj oni liberigis ilin, ĉe 110 aferoj oni ĉesigis la aferojn, ĉe 165 ĝi ankoraŭ ne estas finita. El la kondamnitaj 41 estis je morto, sed nur 37 kondamnitaj estas ekzekutitaj, kvar ricevis ĝismortan karceron. 383 jam finis sian punon, 774 ankoraŭ estas pune malliberigitaj. Ĉiujn verdiktojn oni anoncis en nomo de la ŝtato laŭleĝe.

Laŭ la nunaj registaroj la revolucioj pekis kontraŭ la ŝtatleĝoj; tial oni akuzas ĉiujn, kiuj dum la proletari-diktaturo ion faris laŭ la tiamaĵ ordonoj, kiuj kontraŭas la antaŭajn, nun denove valorantajn leĝojn.

Dum 95 tagoj oni pritraktis la aferon de la popolkomisarioj, kiujn la ŝtatafunkcio akuzas pro 71 mortigoj, kiel insfignitoj pro eldonitaj ordonoj kaj pro majestecofendo, ribelo kaj pli malgrandaj kulpoj.

Certe tiu ĉi estas la plej interesa, plej grandega justec-afero de nuna epoko. La verdiktojn oni ankoraŭ ne eldiris.

El la regantaj partioj ĉiuj staras sur bazo de leĝkontinueco. Sed dum unu parto eĉ nun opinias, ke ankaŭ la reĝo de la lando estas ankoraŭ Karlo IV., ĉar li ne abdikis, nur transdonis la liberan elektraĵon al la nacio, alia partio konsideras, ke Karlo ne plu estas reĝo kaj volas nacian reĝon. Sed ambaŭ konsideras la landon reglando sendependa.

Espereble ĝi mem ekiras sur la vojo de pli bela estonteco.

LETERO EL PALESTINO.

Haifa, decembro 1920.

La Sankta Lando judigas pli kaj pli, tagon post tago. La plimulto da enmigrintoj estas judoj, la terenoj de kelkaj distriktoj estas plimulte en manoj de judoj, la plimulte da fervoĝarantaj estas judoj. Oficialaj sciigoj publikigas hebreajn ĵurnalojn hebreaĵ kaj afiŝoj hebreaĵ en la ŝtiranguloj abundas, poŝtmarkoj havas surprazon hebrean, eĉ la unua

La mondon konvinkas nur praktiko.

Tial praktike uzu kaj uzigi Esperanton per **UEA!**

CANTON (Ĉinio). S-ro Sinpak malfermis Esp. kurson en lernejo „Kristana Kolegio“ kun pli ol 40 partoprenantoj.

DOBRIŬ apud Dresdas (Germanio). S-ro instruisto E. Friebel instruas 25 lernantojn de la loka lernejo en Esperanto kiel libervola fakulo. Krom tio kurso por plenaĝuloj. En Niedersiedlitz kaj Neuostra Esperanto enradikiĝis. La loka gazeto „Dresdner-Pirnaer Tageblatt“ publikigas regule propagand-artikolojn.

NEW YORK (Usono). Esperantaj kursoj funkcias ĉiusemajne ĉe sekv. lernejoj: Washington Irving High School; Public School (por rusoj); Rand School of Social Science (por socialistoj); Russian Technical Aid School; Emanuel Church, Rainbow Circle (por Bahanoj); Privata Lernejo ĉe f-ino Lincoln, Brooklyn.

RADEBEUL (Germ.). Laŭ raporto en „Radebeuler Tageblatt“ de 24. dec. Esperanto nun estas enkondukita en la realgimnazion „In der Lössnitz“ (la unua pialta lernejo de Saksio). 30 lernantoj de la dua ĝis kvina klasoj lernas entuziasme sub la gvidado de instruisto Löffler. La direktoro de la instituto, supera studa direktoro Fritzsche, tre simpatias kun nia lingvo kaj sendis rekomandan raporton al la saksia instru-ministerio.

SOFIA (Bulg.). En la Universitato okazas kurso por studentoj, gvidata de Janko Teodorov. TAIHOKU (Formosa, Japanio). S-ro Ren instruas ĉiusepere Esperanton ĉe Daitoŝi popola virina lernejo por Formosanoj. Ĉiuj lernantoj estas instruistoj.

Tutmonda Help-Agado por la malsat-suferantaj germanaj infanoj.

Ĉi sube ni represas avokcon de la Germana Esp. Komerc Korporacio, kiun ni rekomendas al la aliento de niaj legantoj. Kvankam ni opinias la kunigon de partumo kun Esperanto kaj bonfaro iom sengusta, ni tamen petegas pri atenti la avokcon kaj sendi latipove kaj laŭvole monrimedojn por la mizeruloj suferantaj je malsato, frosto kaj malsanoj.

Sufiĉe konata fakto estas, ke la granda mizero, kiun la bedaŭrinda milito postlasis al ĉiuj popoloj, speciale ekkaptis milionojn da germanaj infanoj. Nur la riĉuloj povas aĉeti la tro multekostajn vivrimedojn, vestaĵojn, ŝuojn ktp., dum la malriĉaj infanoj senfine malsat-suferadas kaj mortas amase ĉiutage pro manko de necesega nutraĵo, frostas pro manko de karboj, loĝante en obskraj keloj de la grandurboj. Precipe monrimedoj estas necesaj por helpi dolĉigi la mizeron de la malsategaj infanoj.

La Germana Esp. Komerc Korporacio en Berlin-Steglitz entreprenas tutmondan help-agadon por tiuj ĉi mizeruloj, speciale en esperantistaj rondoj, kaj disponigas al tiu ĉi celo 1000 boleteojn de sia mondparfumo „Esperanto“. Po unu boleteo estas sendita al bonfaranto, kiu sendos en letero minimume 1 ŝilingon aŭ 2 frankojn aŭ 10 germanajn markojn aŭ pli per monbiletoj aŭ per poŝteĉek-konto Berlin n-ro 104800, al suba adreso. La kolektita monsumo estos publikigata en „Berliner Tageblatt“ sub la nomo de la Esp. Komerc Korporacio.

Savu la malsatajn infanojn! Kiu donas tuj, tio donas duoble! Kiel kviancon ĉiuj mensendontoj ricevos tuj boletejon de la mondparfumo „Esperanto“.

Adresu leterojn al:

Germana Esperanta Komerc Korporacio
Joh. Schwaiger & K-io
Berlin-Steglitz (Germ.).

Skribintoj

al la redakcio de ET, kiuj ne ankoraŭ ricevis respondon, estas petataj pacienciĝi kelkan tempon, ĉar mi estas nun tre okupata. Depost la 15-a de la ekspedado de ET estos prizorgata de mia fratino, kaj tiam mi supozeble havos tempon por ĉiam tuj respondi. Mi dankas al ĉiuj, kiuj je la Nova Jaro sendis siajn bondezirojn kaj gratulojn, kaj per ĉi tiu respondo ilin plej kore. T. J.

